



 \rightarrow

KIU EMAS PLENDI?

(kvazaŭ raporto je la respondeco de la subskribinto)

Esti volontulo en iu ajn Esperanto-organizaĵo, cefe en la sidejo de BRAZILA ESPERANTO-LIGO, signifas terure sperti la veran situacion de la Movado.

Tuj komence la trista konstato: kelkaj konsiderataj gravuloj ne pagas kotizon al la Ligo, pro krastas remembriĝon aŭ restas eterna komencanto kaj fiera membro-simpatianto (M-S), tio estas, apartenas al la plej malalta kategorio, kies unu sola pago por la tuta jaro (kiel vi scias) estis nur Cr\$ 7.000 (ĝis 28/2/85) kaj fariĝis (pro la inflacio!) Cr\$ 15.000 ekde-marte ĝis la jarfino. Malpli ol unu sola tagmanĝo en tre malbona restoracio!

Do, kiam oni parolas, prelegas, artikolas pri krizoj, stagno, neagado, neplanado, neeldonado de vortaroj, lernolibroj ktp. ktp., oni tute ne tuŝas la kernon, ĉar oni ĝenerale preferas plendi, kritiki, misinformi, ĉagreniĝi, ofendi, kaj ofendiĝi je distanco. Certe tio okazos rilate al ĉi tiu artikolo, kiun ni verkas kuraĝe kaj morale. Eĉ ni pensas, kio okazus se eventuale ni fariĝus BEL-Prezidanto ... Ĉu ni havus lojalajn partianojn?

La plej malbona flanko de la historio (kies vera titolo parodie devus esti KAKTOJ KAJ FANTAS-MAGORIOJ) kuŝas en tio, ke ĝuste la distanculoj rilate al la ĝisfundaj problemoj nepre konsideras sin la <u>savantoj de la patrujo</u>.

Oni jam diras (iomete klaĉe), ke la aŭtoro de ĉi tiuj linioj "sanĝis la ĉemizon" pro la konstato, ke fojfoje lia nomo aperetas en BEL INFORMAS, kiel eventuala kunlaboranto en io ajn.

Cu signifas nun, ke kunlaborado en Esperantujo fariĝas ia makulo?

Dum nia modesta volontuleco ni klopodas samtempe kompreni ĝisfunde la situacion de BEL, kiel la sola brazila UEA-peranto nuntempe, kiel organizaĵo, kiu regule deĵoras por mendi librojn al eks terlando, disvendi ilin al la tuta lando, aranĝas seninterrrompe ĉiunivelajn kursojn por korespondado, informas akurate (ne laŭbezone) pri la tuta Movado. Kaj ĝuste pro ĉio ĉi, multaj "idealistoj" agas kvazaŭ nia BRAZILA ESPERANTO-LIGO estus "bopatrina domo", en la malbona senco de la vortoj!

Se vi dubas, venu vi mem al la sidejo kaj tralegu kuriozegajn korespondaĵojn, kiuj abundas en la arkivo. Por eviti laciĝon sufiĉas, ke vi tralegu la lastajn, kaj se vi havas normalan cerbon vi tuj konvikiĝos, ke administri nian Movadon estas misio por sanktulo.

KULTURKUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL - PROGRAMO POR OKTOBRO/85

- 05/10 VARIA KUNVENO (informoj, skeĉoj, vortludoj, poezio, muziko ktp ...)
- 12/10 Ne okazos kunveno: feria tago
- 19/10 VARIA KUNVENO
- 26/10 ĜENERALA ORDINARA KUNSIDO

* Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la 16-a horo *

Antaŭ nelonge, ekzemple, kiel volontulo ni akceptis telefonalvokon. La telefoninto (iu el tiuj gravuloj) volis meze de la jaro remembriĝi al UEA, sed nur per la telefono, kvankam li loĝas en Rio mem kaj laboras en la urbocentro. Detalo: li nur volis, ke oni informu la ĝustan valoron de la MA-kotizo pagenda al UEA (li ricevas la bultenojn kun informo, sed ne havas tempon ilin tralegi), por ke li sendu ĉekon al la "bopatrina domo" kaj la dirita organizaĵo senpage kaj sindone tuj prizorgu ĉion: enkasigo de la ĉeko (kelkfoje la ĉekoj ne havas kapitalon!), kalkulado de la bankaj elspezoj (vi scias, ke nune la kurzo ŝanĝiĝas ĉiutage), tajpado de UEA-dokumentoj, iro al la banko kaj finfine nova tajpado kaj marŝado al la poŝtoficejo. UF! Grava detalo: LI NE ESTAS MEMBRO DE BEL!

Ĉu vi pensas, karaj gelegantoj, ke tiaj uloj fariĝas dankemaj pro tio, ke oni laboras por ili tute senpage? Absolute ne. Multkaze la esperantistoj tute ne agas kiel samideanoj, kunfratoj, idealistoj, homaranoj. Vere strange, multaj fariĝas veraj ekzekutistoj kontraŭ la viktimoj efektive deĵorantaj sindone sur la batalkampo mem.

Tial, la subskribinto "kuraĝe sed elegante" demandas: ĉu la ultimato en la Rezolucio de Florianópolis per si mem solvas la problemojn? Ĉu la plej perfekta teoria skizo aŭ organigramo sukcesos funkcii surbaze de la samaj homoj kaj sintenoj? Ĉu alia organizaĵo havos kompetentan estraron (VERA ESTRARO!), kiu prenos serioze la sanktan taskon prizorgi UEA-peradon, malfacilan importadon kaj disvendadon de libroj por la tuta lando? Ĉu kunfandiĝo solvus la problemojn? Kiaj ni estu?

Ne hastu por la respondo. Pensu mature. Eble vi mem kandidatiĝos al la venonta BEL-oficperio do.

Finfine valoras la penon memori kaj praktiki la ZAMENHOFAN PROVERBON: "Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, en la tuta urbo estos ordo".

JORGE DAS NEVES
Caixa Postal 88
RIO DE JANEIRO, RJ
CEP 20.001

LA PREZIDANTA SINTENO

Por eviti daŭraj misinterpretoj kaj miskomprenoj, ni publikigas ĉi-sube la sintenon de la Prezidanto de BEL, S-ro Fernando Marinho, rilate al la nuna situacio de la Brazila E-Movado, esprimitan en la lasta Ĝenerala Ordinara Kunsido, okazinta la pasintan 29-an de Junio ĉi-jare:

"Por ke oni ne plu misinterpretu la sintenon de la prezidanto de Brazila E-Ligo rilate al eventualaj ŝanĝoj, ne nur en la strukturo de la Brazila Movado sed eĉ en la Statuto de la Ligo mem, S-ro Marinho emfazis, ke li tute ne estas antaŭjuĝe kontraŭ iu ajn ŝanĝo. Aldone, li sugestis, ke oni devas serĉi la kandidatojn al la vakontaj postenoj de la estraro de nia Asocio por proponi, ke ili metu en siajn platformojn tion, kion la esperantistaro konsideras fakte urĝa kaj grava. Tiamaniere, okaze kaj pere de balotado, ni havos la ŝancon enpostenigi la plej taŭgan kandidaton al la prezidanteco de BEL. Fine, li asertis, ke la momento ne estas por devigi, ke la Limento estas por serĉi batalantojn, nur por ŝajnigi, ke ĝi agas laŭ demokratia sistemo. La momento estas por serĉi batalantojn, kiuj estas pretaj baldaŭ anstataŭi la nunajn estraranojn kaj agi laŭ la volo de la plimulto, surbaze de diskonigita platformo".

GENERALA ORDINARA KUNSIDO DE BEL

Laŭ la 8-a artikolo de la Statuto de BEL, dufoje jare, devas okazi Ĝenerala Kunsido. Tiuj Kunsidoj karakteriziĝas per demokratia kaj libera diskutado de la problemoj de BEL kaj de Esperanta movado ĝenerale. Jen, denove, alvenis tiu momento!

La 26-an de oktobro, sabaton, je la 4-a p.t.m., okazos la 2-a Ĝenerala Kunsido de ĉi tiu ja-ro. Estis fiksitaj por la tagordo la jenaj temoj:

- 1 Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunsido;
- 2 Regularo pri Balotado;
- 3 Buĝeto por 1986;
- 4 Eventuala prezentado de kandidatoj al la venonta estraro;
- 5 Elekto de UEA-delegito/Rio de Janeiro;
- 6 Ĝeneralaj temoj.

La 7-an de decembro 1985, sabaton, nepre okazos Eksterordinara Ĝenerala Kunsido por elekto, laŭ la Regularo pri Balotado, aprobota de la ĵus kunvokita Ĝenerala Kunsido, la Estraron, la Konsultiĝar onsilantaron kaj la Kontrolan Konsilantaron de BEL por la jarkvaro 1986/1989.

: Kun bedaŭro, ni komunikas la forpason, je la 8-a de aŭgusto, de nia bonfarinta bro kaj karmemora samideano LAZARUS BRIEGER. Baldaŭ aperos kompleta nekrologo!

PROVITA KAJ PRUVITA LA EFIKO DE LA RAPIDA KURSO "KANTU KAJ LERNU"

Fine de julio lasta, Sylla Chaves sukcese uzis sian novan instru-materialon KANTU KAJ LERNU en tri rapidaj kursoj, okazintaj en la urboj Belo Horizonte, Itabuna kaj Ilhéus. Li instruis al

ĉirkaŭ 200 gelemantoj entute. Ĉiu kurso estis 6-hora, respondante al la 6 lecionoj de la instruilaro. En Belo Horizonte, la kurso estis farita en du matenoj, dum la 21-a Brazila E-Kongreso; en Itabu na, en tri vesperoj de la sekvanta semajno; kaj en Ilhéus, sabate, posttagmeze kaj dimanĉe matene. Ĉiuloke estis entute 6 unuhoraj le cionoj.

La instru-materialo konsistas el legolibro, gvidlibro, afiso kaj 4 disketoj (aŭ unu sonbendo). Helpe estas uzataj gramofono, son bendaparato kaj unu aŭ pliaj laŭtparoliloj. La tekstoj enhavas 20 kantojn kaj multajn dialogojn. La instruisto donas la gramatikan LA ITABUNA KURSO bazon por la kompreno de la tekstoj, tradukas ilin kaj respondas eventualajn demandojn. La gelernantoj kune legas kaj kantas, akompanante la sonbendon. La celo de la kurso -- KOMPRENI parolatan, kantatan kaj legatan Esperanton -- estis plene atingita. En la fino de la tri kursoj, la gelernantoj kune kantis LA ESPEROn, komprenante ĝian tutan enhavon. La 600 vortelementoj de la kurso estis elektitaj pro ilia ofteco.

Post du horoj da memlernado, Tolstoj jam estis kapabla sufiĉe bone legi en Esperanto. Tial ne estas surprizo, ke homoj malpli kapablaj ol li atingas tiun saman rezulton post 6-hora lernado kun la helpo de instruisto kaj de modernaj instruiloj. La efiko de KANTU KAJ LERNU estas provita kaj pruvita. Normala homo povas lemi Esperanton en ses horoj. Mankos nur la hejma solidigo de la lernitaĵoj pere de akiritaj libroj kaj sonmaterialo. Kaj ankaŭ la posta daŭrigo ĝis 1500 vortelementoj, pere de la jam akirebla kolekto LERNU KANTANTE por memlernantoj.

Meritas laŭdon la organizantoj de la 21-a Brazila E-Kongreso, la E-movado de Suda Bahio kaj la urbestro de Itabuna, D-ro Ubaldo Dantas, kiuj kune ebligis tiun sukceson. Similaj kursoj certe baldaŭ okazos en aliaj brazilaj urboj, kaj verŝajne la unua el ili okazos en VITÓRIA DA CONQUISTA, laŭ interkonsento kiu nun fariĝas inter la instruisto, la loka Esperanto-movado kaj la lokaj aŭ-toritatuloj.

KULTURA SEMAJNO EN BRASÍLIA

De la 22-a ĝis la 28-a de Julio, Esperanto-Asocio de Brasília (Caixa Postal 11-1124, 70084-BRASÍLIA, DF) okazigis Kulturan Semajnon, en kiu enskribiĝis 23 esperantistoj el 8 brazilaj ŝtatoj.



Ĉe Restoraci-dan cejo, ĉiuj amuzi ĝis ĝis frumatene. Sur la foto EAB-prezidantino kaj kurspartopren

La Semajno konsistis el rondo da prelegoj kaj el 21-hora kurso pri "La Arto Traduki en/el Esperanto(n)", gvidita de Leopoldo H. Knoedt. Li jam tradukis el la portugala, angla, franca, germana kaj hispana, artikolojn por Brazila Esperantisto, Norda Prismo, Monda Kulturo kaj Fonto. Krome, li estas la tradukinto de pluraj gravaj verkoj, inter ili "Elektitaj Poemoj de Castro Alves, kaj "La Luzidoj" de Luiz de Camões. Li estas ankaŭ la redaktoro por Brazilo de la beletra revuo Fonto.

La matenaj prelegoj estis tri. Waldemir Môreira prelegis pri la instrumetodo "Esperanto Intensiva Tra Brazilo" - instruado kaj evoluado. Nelson Pereira de Souza pri la "Esperanta Kulturo"; kaj Roberto Passos Nogueira montris profundan scipovon pri lingvistiko en sia prelego "Morfologio de la Vorto en Esperanto".

Fariĝis jam kutimo ĉe E.A.B., ke en la lasta vespero, la kurso-partopre nantoj iras al Restoraci-dancejo Varandas, kie ili vespermanĝas, dancas kaj amuziĝas ĝis la unuaj horoj de la sekvanta tago.


kaj kurspartopren. Dimanĉe matene okazis la lasta leciono, la disdono de Atestoj kaj la komuna tagmanĝo. Posttagmeze, tiuj kiuj ne forvojaĝis, vizitis vidindajn lokojn de la Brazila ĉefurbo.

Oni ankaŭ kaptis la okazon de tiu altnivela renkontiĝo kun reprezentantojn el pluraj ŝtatoj por pridiskuti kelkajn aferojn rilate al nia landa Esperanto-movado.

Dum la semajno, la ĵurnaloj aperigis notojn pri la evento kaj Brasilia Super Rádio FM elsendis en 3 tagoj, intervujojn de la kursgvidinto, de Prof. Geraldo Mattos kaj de EAB-membro.

(Lau raporto al ni sendita de EAB)

Dekstre: Dum la ĵus pasinta Brazila Kongreso de Esperanto, Prof. Geraldo Mattos aŭtografas siajn plej novajn poeziajn librojn, eldonitajn de FONTO (La Libro de Nejma kaj La Libro de Adoro). Foto farita de S-ano Roberto Resende kaj ĝentile sendita al ni de EAB.



5.0

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

Info. 5

INFORMOJ PRI ESPERANTO ĈE "JORNAL DA MANHÃ" DE ILHEUS, BAHIA - Regule, aperas novaĵoj pri Esperanto ĉe "Jornal da Manhã", eldonata en Ilheus, Bahia. Tiun informlaboron oni ŝuldas al nia senlaca samideano Eléus Leonardo de Sá.

ALIA ARTIKOLO PRI LA INTERNACIA LINGVO ĈE "JORNAL DO PAÍS" - Sub la titolo "Falta divulgação para Esperanto", "Jornal do País", de la 8-14/08/85, aperigis 60-linian artikolon de S-ro
Silvio Nogueira pri la internacia lingvo. La autoro entuziasme defendas la solvon de la monda
lingva problemo pere de Esperanto.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN CUSTÓDIA, PERNAMBUCO - S-ano Jason Gonçalves de Lima prelegis al cirkaŭ 15 personoj en la urbo Custodia, Pernambuco (350 km. for de Recife), utiligante la afiŝon "Kio estas esperanto".

Instruado

KURSO DE ESPERANTO EN MONAĤEJO - Laŭ informo aperinta en "Klariono", junio/julio 85, komenciĝis antaŭ nelonge baza kurso de Esperanto ĉe "Convento dos Capuchinhos", gvidata de S-anoj Rossano Giusepe F. Arecipo kaj Neider Jatobá. La Kurso okazas sub la aŭspicio de "Associação Alagoana de Esperanto".

ESPERANTO POR INFANOJ, EN SÃO PAULO - Neordinara kurso okazas en São Paulo, ĉe Lernejo "Irmã Catarina (Rua Jupiter 54 - São Paulo): S-ano Pedro Jacintho Cavalheiros instruas la internacian lingvon al infanoj de la antaŭ elementa kurso kaj ankaŭ al tiuj de la elementa kurso. La Lernejo utiligas tiun metodon nomitan "Montessori" (Laŭ "Boletim Informativo da Associação Paulista de Esperanto, abril-junho/85).

KURSO DE ESPERANTO EN NILÓPOLIS, RIO DE JANEIRO - Sub la aŭspicio de "União Municipal Espírita de Nilópolis" okazas kurso de la internacia lingvo ĉe "Centro Espírita Caminhemos com Humildade" (Laŭ "O Sol Nascente", aŭgusto 85).

BAZA KURSO DE LA INTERNACIA LINGVO EN BOA VISTA, RORAIMA - La 6-an de Julio, komenciĝis baza kurso de Esperanto ce Lernejo "13 de Setembro", en la urbo Boavista, RR, kun entute 12 lernantoj.

Diversaj

JUNULARO KONGRESOS EN PORTO ALEGRE - De la 20-a ĝis la 26-a de januaro 1986, okazos, en Porto Alegre, RS., la VIII Brazila Esperantista Junulara Kongreso. La ĉeftemo de la evento estas "Esperanto en la Tria Mondo". La adreso de la Kongresa Komitato estas Cel. Vicente, 408 apto 1005, 90.000-PORTO ALEGRE, RS.

ESPERANTISMO KAJ SPIRITISMO: PARALELA PREZENTO - Interesa portugallingva artikolo pri la komunaj trajtoj inter Esperantismo kaj Spiritismo aperis en la Julia numero de "O Reformador", oficiala organo de Brazila Spiritisma Federacio. Ĝia aŭtoro: S-ano Affonso Soares.

NOVA ESTRARO ĈE "ASSOCIAÇÃO PERNAMBUCANA DE ESPERANTO" - La 27-an de aprilo, estis elektita nova estraro ce Pernambuka Esperanto-Asocio por la oficperiodo 1985/1987, sub la prezidanteco de S-ano Severino Nunes da Costa (Laŭ "Pernambuco Esperantista" julio/85).

20-A DATREVENO DE ESPERANTO-PROGRAMO EN "RADIO SOROCABA" - La 26-an de Majo, Sorokaba Esperanto-Klubo festis la 20-an datrevenon de la Esperanto-programo ĉe "Radio Sorocaba", kiu estas sendata ĉiuvendrede, de la 21-a ĝis la 22-a horo. Tiam estis lanĉita speciala poŝtstampo pri la evento (Laŭ "Boletim Informativo da Associação Paulista de Esperanto, abril-junho/85).

ĈU LA PORTUGALA LINGVO FARIĜOS OFICIALA LINGVO DE UN? - Jen novaĵo publikigita en BIP, aŭg/85 (Boletim de Informação ao Pessoal do Banco do Brasil): "Custou, mas chegamos lá - Os amantes do idioma nacional podem orgulhar-se. A partir do próximo ano, o português será incluído como a sétima língua oficial a ser usada na ONU. Nada mais justo! Afinal, o idioma é utilizado por mais de 160 milhões de pessoas em cinco continentes, cobrindo uma área de 10 milhões de quilômetros quadrados. Falado há um milênio e escrito pelo menos há sete séculos, o português é a quinta língua do mundo, perdendo apenas para o chinês, inglês, russo e espanhol". Riu povas konfirmi tion?

II SEMAJNO SPIRITISTA-ESPERANTISTA DE BANGU - De la 25-a ĝis la 31-a de aŭgusto, okazis, sub la aŭspicio de "Uniao Distrital Espirita de Bangu", la "II Semana Espirita Esperantista de Bangu", per aro da prelegoj pri Esperanto kaj Spiritismo.

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA ELDONOS DISKON PRI BRAZILA MUZIKO EN ESPERANTO - El cirkulero al ni sendita de EAB: "La iniciato konsistas en la lancado de disko kun nuntempa brazila populara muziko kantata en esperanto, celanta atingi ĉefe la ankoraŭ ne-esperantistan publikon, pere de ""' kaj FM radistacioj. Por fari la surdiskigon, la invitito estis Flávio Fonseca, profesia kan-sto/komponisto". Antaŭmendoj ĉe EAB: Caixa Postal 11-1124, 70084-BRASÍLIA, DF.

NOVA ADRESO DE RORAJMA ESPERANTO-ASOCIO - Caixa Postal 61, 69.300-BOA VISTA, Roraima.